La viva genro preter akordo

Interagoj de semantiko kun sintaksa rolmarkado

Marc Bavant

Interlingvistikaj Studoj – AMU 2008

Celo de la studo

- Esplori kiel la semantika nocio *vivanteco* efikas
  - En diversaj lingvoj
  - En diversaj kampoj
    - Genraj sistemoj
    - Sintaksa rolmarkado

Fadeno

- *Genro* estas semantike bazita kategoriigo kun morfologia kaj sintaksa manifestiĝoj; kriterioj: sekso, sed ne nur

Genro (1/5)

- Problemaro
  - Ideologia vidpunkto: ne pritraktita
  - Tri vidpunktoj
    - Semantika: kategoriigo laŭ kriterioj
      - Arbitreco aŭ racieco?
      - Rolo de vivanteco kaj/aŭ personeco
    - Morfologia
      - Laŭgenraj paradigmoj
      - Rolo de morfologio (formo) en genra asignado
    - Sintaksa
      - Akordo: adjektivoj, verboj, determiniloj... fojfoje eĉ adverboj
      - Alia

Genro (2/5)

- Hind-eŭropaj sistemoj

Pra-hindeŭropa, hitita
Viva
Aĵa

Genro (2/5)

- Hind-eŭropaj sistemoj

Pra-hindeŭropa, hitita	Sanskrita, latina, helena...
Viva	Ina
	Vira
Aĵa	Neŭtra

Genro (2/5)

- Hind-eŭropaj sistemoj

<table>
<tr><th>Pra-hindeŭropa, hitita</th><th>Sanskrita, latina, helena...</th><th>Latinidaj, baltaj lingvoj</th></tr>
<tr><td rowspan="2">Viva</td><td>Ina</td><td>Ina</td></tr>
<tr><td>Vira</td><td rowspan="2">Vira</td></tr>
<tr><td>Aĵa</td><td>Neŭtra</td></tr>
</table>

Genro (2/5)

- Hind-eŭropaj sistemoj

Pra-hindeŭropa, hitita	Sanskrita, latina, helena...	Nederlanda, skandinaviaj lingvoj
Viva	Ina	Komuna
	Vira	
Aĵa	Neŭtra	Neŭtra

Genro (2/5)

- Hind-eŭropaj sistemoj

Pra-hindeŭropa, hitita	Sanskrita, latina, helena...	Armena, irana
Viva	Ina	Komuna
	Vira	
Aĵa	Neŭtra	

Genro (3/5)

- Sistemo de la araba
  - Dugenra sistemo: vira ~ ina
  - Parte arbitra
  - Substantivoj kaj adjektivoj
    - Ingenra morfemo ـَة „-at“
    - Akordo de adjektivoj
      - كَلْبٌ خَمِيلٌ kalbun jamīlun „hundo bela“
      - كَلْبَةٌ خَمِيلَةٌ kalb-at-un jamīl-at-un „hundino bela“
  - Verboj: distingo ina/vira ĉe la dua kaj tria personoj
  - Speciala akordo en plurnombro
    - Nepersonoj akordiĝas en ina ununombro
      - كِلَابٌ خَمِيلَةٌ kilābun jamīl-at-un „hundoj belaj“
      - la hundoj ŝi-kuras

Genro (4/5)

- Sistemo de la turka
  - Modela ekzemplo de lingvo „sengenra”
  - Personaj pronomoj ne konas genron (*o* = *li*, *ŝi*, *ĝi*)
  - Kelkaj substantivoj estas seks-indikaj
    - *baba* : patro, *anne*: patrino
    - sed *kardeş*: frato aŭ fratino
  - Ne ekzistas genra derivado per afiksoj
  - Sed ekzistas seks-indikaj apudmetoj
    - *erkek kardeş* (viro-frat(in)o) „frato“
    - *kız kardeş* (knabino-frat(in)o) „fratino“
    - *dişi köpek* (ino-hundo) „hundino”
  - La lingvo distingas inter *kim* (kiu?) kaj *ne* (kio?)
    - Sed ne inter *tiu* kaj *tio*

Genro (5/5)

- Seksa valoro de iuj substantivaj morfemoj
  - Virseksa: *vir*, *patr*, *knab*, *ĉj*, *taŭr*, *kok*?...
  - Inseksa: *in*, *nj*, *dam*,...
  - Senseksa: *tabl*, *ide*, *herb*...
  - Seksindiferenta (persono aŭ besto): *infan*, *bov*, *student*?, *ul*?, *ist*?,...
  - Ambaŭseksa: *ge*
- Personaj pronomoj konas „genron” (*li*, *ŝi*, *ĝi*)
  - *Li* (virseksaj personoj), *ŝi* (inseksaj personoj), *ĝi* (ĉio alia)
    - Ĉu *li* (*ŝi*) povas referenci al virseksa (inseksa) besto?
    - Kiu pronomo referencas al persono de nekonata sekso?
    - Ĉu *ĝi* povas referenci al persono?
- U- kaj O-korelativoj (persono ~ nepersono)
  - Kiu kantis? (persono), Kio kantis? (besto, aĵo [metafore])
  - Sed U-korelativoj povas referenci al io ajn pro elipso

Fadeno

- *Genro* estas semantike bazita kategoriigo kun morfologia kaj sintaksa manifestiĝoj; kriterioj: sekso, sed ne nur
- La slavaj lingvoj uzas la kriterion *vivanteco* en siaj genraj sistemoj, tiel rekreinte la kontraŭmeton inter viva kaj aĵa genroj de la *pra-hindeŭropa* (PHE)

Viva genro en slavaj lingvoj (1/6)

- Sistemo de la rusa
  - Uzas genitivon anstataŭ akuzativon por vivantaj signifatoj
    - Preskaŭ ĉiam, krom se ekzistas akuzativa formo ≠ nominativa

		лампа (lampo) *in- kaj aĵ-genra*	**курица** (kokino) *in- kaj viv-genra*	**сирота** (orfo) *vir- kaj viv-genra*	**стол** (tablo) *vir- kaj aĵ-genra*	**вол** (bovo) *vir- kaj viv-genra*	**нить** (fadeno) *in- kaj aĵ-genra*	**мать** (patrino) *in- kaj viv-genra*
Ununombro	Nom.	лампа	курица	сирота	стол	вол	нить	мать
	Aku.	лампу	курицу	сироту	стол	вола	нить	мать
	Gen.	лампы	курицы	сироты	стола	вола	нити	матери
Plurnombro	Nom.	лампы	курицы	сироты	столы	волы	нити	матери
	Aku.	лампы	куриц	сирот	столы	волов	нити	матерей
	Gen.	ламп	куриц	сирот	столов	волов	нитей	матерей

Viva genro en slavaj lingvoj (2/6)

- Hind-eŭropaj sistemoj

Pra-hindeŭropa, hitita	Sanskrita, latina, helena...	Rusa
Viva	Ina	Ina-viva
		Ina-aĵa
	Vira	Vira-viva
		Vira-aĵa
Aĵa	Neŭtra	Neŭtra-viva
		Neŭtra-aĵa

Viva genro en slavaj lingvoj (3/6)

- Sistemo de la pola
  - Viva genro kiel subgenro ekskluzive de la vira genro
  - En plurnombro vivanteco reduktiĝas al personeco (homeco)

		Ununombro	***Plurnombro***
Vira genro	Vira-persona genro (kozako)	Aku. = Gen.	Aku. = Gen.
		kozak, kozaka, kozaka	*kozacy, kozaków, kozaków*
	Vira-besta genro (heliko)	Aku. = Gen.	Aku. = Nom.
		ślimak, ślimaka, ślimaka	*ślimaki, ślimaki, ślimaków*
	Vira-aĵa genro (pugno)	Aku. = Nom.	Aku. = Nom.
		kułak, kułak, kułaka	*kułaki, kułaki, kułaków*
Ina genro (patrino)		Aku. = Nom. aŭ specifa	Aku. = Nom.
		matka, matkę, matki	*matki, matki, matek*
Neŭtra genro (fenestro)		Aku. = Nom.	Aku. = Nom.
		okno, okno, okna	*okna, okna, okien*

Viva genro en slavaj lingvoj (4/6)

- Hind-eŭropaj sistemoj

<table>
<tr><th>Pra-hindeŭropa, hitita</th><th>Sanskrita, latina, helena...</th><th>Rusa</th><th>Pola</th></tr>
<tr><td rowspan="4">Viva</td><td rowspan="2">Ina</td><td>Ina-viva</td><td rowspan="2">Ina</td></tr>
<tr><td>Ina-aĵa</td></tr>
<tr><td rowspan="2">Vira</td><td rowspan="2">Vira-viva</td><td>Vira-persona</td></tr>
<tr><td>Vira-besta</td></tr>
<tr><td>Aĵa</td><td>Neŭtra</td><td>Vira-aĵa</td><td>Vira-aĵa</td></tr>
<tr><td rowspan="2">Aĵa</td><td rowspan="2">Neŭtra</td><td>Neŭtra-viva</td><td rowspan="2">Neŭtra</td></tr>
<tr><td>Neŭtra-aĵa</td></tr>
</table>

Viva genro en slavaj lingvoj (5/6)

- Sistemo de la malnovbulgara
  - La malnovbulgaraj tekstoj ne povas montri klaran sistemon
  - La viva genro instaliĝas iom post iom
    - Propraj nomoj de viroj

Joh. 1:43	обрѣте филипа	[li] trovis Filipon
Joh. 1:48	видѣ же исъ натанаилѣ грѧдѫшта къ себѣ	Jesuo vidis Natanaelon venantan al li

    - Viroj

Joh. 5:20	отц [в]о любитъ сна	ĉar la patro amas la filon
Luk. 1:13	і жена твоѣ елисаветь родитъ снъ тебѣ	kaj via edzino Elizabeto naskos al vi filon

    - Bestoj

Joh. 10:12	видитъ влъка грѧдѫща і оставлѣатъ овъцѧ и бѣгаатъ
	[li] ekvidas la lupon venantan kaj lasas la ŝafinojn kaj forkuras
Mar. 11:2	абие въходѧшта вь нѫѭ обрѧштета жрѣбецъ привѧзанъ
	enirinte en ĝin, vi tuj trovos azenidon alligitan

    - Diversaj

Joh. 12:36	вѣроуите въ свѣта	kredu al la lumo
Luk. 11:33	да въходѧштеи видѧтъ свѣтъ	por ke la enirantoj povu vidi la lumon

Viva genro en slavaj lingvoj (6/6)

- Jen la situacio
  - Kunfandiĝo de deklinaciaj paradigmoj: abundeco de morfemoj
  - Fonetika eluziĝo de la finaĵoj
    - Malapero de la distingo inter nominativo kaj akuzativo ĉe virgenraj substantivoj (ununombro)
      - ѕъıнъ (nom. un.) ~ ѕъıнъ (aku. un.) // ѕъıнове (nom. pn.) ~ ѕъıнъı (aku. pn.)
  - Jamaj uzoj de genitivo en objekta funkcio (partitivo, neado, regado)
- Jen la bezonoj
  - Konservi distingon subjekto/objekto, se la substantivoj havas vivantajn signifatojn
    - *Petro batas Paŭlo: kiu batas kiun?
  - Konservi liberan vortordon
- Rezulto: enkonduko de vivanteco en la genran sistemon

Fadeno

- *Genro* estas semantike bazita kategoriigo kun morfologia kaj sintaksa manifestiĝoj; kriterioj: sekso, sed ne nur
- La slavaj lingvoj uzas la kriterion *vivanteco* en siaj genraj sistemoj, tiel rekreinte la kontraŭmeton inter viva kaj aĵa genroj de la *pra-hindeŭropa* (PHE)
- Tiu rekreado fontas el bezono distingi subjekton kaj objekton precipe ĉe nomvortoj kun vivanta aŭ homa signifato (diferencigita markado)

Markado (1/3)

- Markadaj rimedoj
  - Vortordo
  - Kaza fleksio, prepozicioj, postpozicioj
  - Verba krucreferencado
- Diferencigita markado: kondiĉita de iu kriterio
  - Semantika kriterio de vivanteco aŭ personeco
    - *Petro batas Paŭlo
    - *Petro batas tapiŝo
  - Aliaj kriterioj
    - Vortordo, morfologio, difiniteco...

Markado (2/3)

- Parta markado ankaŭ en Esperanto
  - Distingo subjekto~objekto ne ĉiam eblas per *n*-finaĵo
  - Adverboj, numeraloj, *ambaŭ*, ES-korelativoj, infinitivoj, *ke*-propozicioj, citaĵoj, fremdaĵoj...
    - Ambigueco ofte forigebla per semantiko, akordo, vortordo, anstataŭaj prepozicioj...
  - Subjektaj kaj objektaj suplementoj de agsubstantivo
    - *La refutado de la fakulo (subj.) de la hipotezo (obj.)
    - fare de la fakulo, al la hipotezo
  - Duobla objekto de faktitivo de transira verbo
    - igi Petron (subj.) manĝi kukon (obj.)
    - *manĝigi Petron kukon → manĝigi kukon al Petro
    - *konstruigi laboristojn muron → konstruigi muron per laboristoj (?)

Markado (3/3)

- Verba krucreferencado
  - Persona-genra-nombra-kaza akordo
    - Inter liberaj kaj ligitaj argumentoj
  - Latina
    - *Consules donum reddiderunt* : konsuloj(n) donaco(n) redonis
    - *Reddiderunt* postulas plurnombran triapersonan subjekton: *consules*
  - Franca (parola)
    - *Sandrine, son mari, elle le voit*
      - Alinjo, ŝia edzo, ŝi lin vidas (Alinjo vidas sian edzon)
    - *Sandrine, son mari, il la voit*
      - Alinjo, ŝia edzo, li ŝin vidas (Alinjon vidas ŝia edzo)
    - *Le professeur, des devoirs, à ses élèves, il leur en donne*
      - La profesoro, hejmtaskoj, al siaj lernantoj, li al-ili da-tio donas

Fadeno

- *Genro* estas semantike bazita kategoriigo kun morfologia kaj sintaksa manifestiĝoj; kriterioj: sekso, sed ne nur
- La slavaj lingvoj uzas la kriterion *vivanteco* en siaj genraj sistemoj, tiel rekreinte la kontraŭmeton inter viva kaj aĵa genroj de la *pra-hindeŭropa* (PHE)
- Tiu rekreado fontas el bezono distingi subjekton kaj objekton precipe ĉe nomvortoj kun vivanta aŭ homa signifato (diferenciga markado)
- *Tipologia klasifiko* de lingvoj laŭ iliaj rimedoj distingi subjekton netransiran, subjekton transiran kaj objekton: *akuzativa* kaj *ergativa* tipoj; „ideala” modelo kaj deflankiĝoj

Ergativeco (1/2)

- Terminoj, skribaĵoj
  - Transiraj verboj: du argumentoj (A: aganto, P: priagato aŭ paciento)
  - Netransiraj verboj: unu argumento (S: „netransira subjekto”)
  - Akuzativ-tipa lingvo: (S=A) ~ P nominativo ~ akuzativo
  - Ergativ-tipa lingvo: (S=P) ~ A absolutivo ~ ergativo
- Plej ekonomia sistemo marki la rolojn
  - Nur akuzativo aŭ ergativo estas markita

Eŭska (ergativ-tipa)	*Esperanto (akuzativ-tipa)*	*Roloj*
Gizona etorri da	La viro venis	S
Gizona**k** gozokia jan du	La viro manĝis la kuko**n**	A
Ni**k** gizona ikusi dut	Mi vidis la viro**n**	P

Ergativeco (2/2)

- Deflankiĝo disde la „ideala” modelo
  - Diferencigita markado (kondiĉita de vivanteco, difiniteco, vortordo...)
  - Parta ergativeco
- Semantike bazita parta ergativeco
  - *Silverstein*-a principo
    - La nomvortoj estas ordigitaj en iu hierarĥio laŭ la nivelo de vivanteco de iliaj signifatoj
    - „Se iu elemento en la hierarĥio alprenas ergativan kazmarkadon, tiam ĉiuj dekstre de ĝi situantaj elementoj alprenas la saman kazmarkadon; kaj se iu el la elementoj alprenas akuzativan kazmarkadon, tiam ĉiuj maldekstre de ĝi situantaj elementoj alprenas la saman kazmarkadon”

Fadeno

- La slavaj lingvoj uzas la kriterion *vivanteco* en siaj genraj sistemoj, tiel rekreinte la kontraŭmeton inter viva kaj aĵa genroj de la *pra-hindeŭropa* (PHE)
- Tiu rekreado fontas el bezono distingi subjekton kaj objekton precipe ĉe nomvortoj kun vivanta aŭ homa signifato (diferenciga markado)
- *Tipologia klasifiko* de lingvoj laŭ iliaj rimedoj distingi subjekton netransiran, subjekton transiran kaj objekton: *akuzativa* kaj *ergativa* tipoj; „ideala" modelo kaj deflankiĝoj
- PHE montras apartaĵojn en sia maniero marki distingon inter subjekto kaj objekto kaj fakuloj opiniis, ke tiuj apartaĵoj reflektas ergativan stadion de PHE

La hipoteza ergativeco de PHE

- Apartaĵoj de PHE
  - Kontraŭmeto viva ~ aĵa genroj
  - Superabunda markado por (la plej malnovaj) vivgenraj substantivoj
    - Nominativa markilo -*s* (*princep-s*, *ovi-s*)
    - Akuzativa markilo -*m* (*princip-em*, *ove-m*)
  - Deficita markado por la aĵgenraj substantivoj
    - Nom. = aku.
    - Nuda radikalo ĉe iuj malnovaj aĵgenraj subst. (*genu*, *mare*, *caput*)
- Ebla evoluscenaro laŭ la hipotezo
  - -ø (absolutivo) ~ -*s* (ergativo)
  - Aĵgenraj subst. ne povas A-roli (aganteco implicas volon)
  - Akuzativa markilo -*m* aperas poste
  - Vastigo de -*s* al S-rolo, transiro al la akuzativa tipo

Fadeno

- Tiu rekreado fontas el bezono distingi subjekton kaj objekton precipe ĉe nomvortoj kun vivanta aŭ homa signifato (diferenciga markado)
- *Tipologia klasifiko* de lingvoj laŭ iliaj rimedoj distingi subjekton netransiran, subjekton transiran kaj objekton: *akuzativa* kaj *ergativa* tipoj; „ideala” modelo kaj deflankiĝoj
- PHE montras apartaĵojn en sia maniero marki distingon inter subjekto kaj objekto kaj fakuloj opiniis, ke tiuj apartaĵoj reflektas ergativan stadion de PHE
- Tiu hipotezo estis refutita ĉ. 1980 surbaze de iu lingva universalaĵo (*Silverstein-a principo*)

La hipotezo – refutita

- Kontraŭantoj
  - Villar, Rumsey: The chimera of PIE ergativity, 1987
  - La refuto ŝajnas vaste akceptata nun
- Aĵgenraj nomvortoj ja povas A-roli!
  - „Ne ekzistas tia limigo en ergativ-tipaj lingvoj”
  - Se la ergativa hipotezo ĝustas, la identeco de nom. kaj aku. ĉe aĵgenraj subst. devas esti interpretata kiel tippartigo
    - Pronomoj kaj vivgenraj subst.: ergativa sistemo
    - Aĵgenraj subst.: neŭtra sistemo
- La tippartigo kontraŭdiras la *Silverstein*-an principon
  - Laŭ la universalaĵo aĵgenraj subst. plej bezonas ergativan markadon
  - Sed okazas la malo en PHE!

Fadeno

- *Tipologia klasifiko* de lingvoj laŭ iliaj rimedoj distingi subjekton netransiran, subjekton transiran kaj objekton: *akuzativa* kaj *ergativa* tipoj; „ideala” modelo kaj deflankiĝoj
- PHE montras apartaĵojn en sia maniero marki distingon inter subjekto kaj objekto kaj fakuloj opiniis, ke tiuj apartaĵoj reflektas ergativan stadion de PHE
- Tiu hipotezo estis refutita ĉ. 1980 surbaze de iu lingva universalaĵo (*Silverstein-a principo*)
- Ni volis kontraŭi la refutadon montrante, ke la apartaĵoj de PHE estas pravigeblaj per interagoj inter vivanteco kaj la *sintaksaj roloj* ; la interagoj povas fonti el hipoteza substantiva deveno de la verbo

Ĉu saĝas uzi universalaĵon ĉi-demande?

- Kiel absoluta povas esti universalaĵo?
  - Comrie:
    - „Preskaŭ neeblas en multaj okazoj empirie distingi inter absolutaj universalaĵoj kaj fortaj tendencoj”
  - *Silverstein*-a principo havas multajn konatajn esceptojn
  - Rumsey uzas modifitan version de ĝi
    - „Al neniu lingvo kun ergativa kazmarkado por personaj pronomoj kaj vivgenraj substantivoj mankas ergativa kazmarkado por aĵgenraj substantivoj”
    - Implica universalaĵo kun forte malgrandigita aplikkampo
- Ĉu PHE estas lingvo, al kiu universalaĵoj aplikiĝu?
  - Se jes, kial ne enigi PHE-an en la samplon?
  - Vd refutadon de Jakobson al la triseria sistemo de eksplodsonoj

Origino de la transira konstruo

- Ergativo estas oblikva kazo
  - Ofte parenca kun instrumentalo, ablativo aŭ lokativo
- Origino de la transira konstruo
  - Pasiva origino?
    - Viro mortigis urson → urso estis-mortigita fare-de-viro
    - Sago mortigis urson → urso estis-mortigita helpe-de-sago
    - Aganto = instrumento en multaj lingvoj
  - Substantiva origino?
    - La viro mortigis la urson →
      - Urso-mortigo fare-de-viro (aganto = instrumento)
      - Urso-mortigo en/elde-viro (aganto = kie troviĝas la volo agi)
      - Mortigo elde-viro (ablativo) al-urso (alativo)
    - La arbo mortigis la urson → Urso-mortigo ???
      - Se aganto estas senviva, konkretaj kazoj malfacile sonas figursence

Semantikaj-sintaksaj embarasoj ĉie

- Lingvoj kun semantike bazita markado
  - Ĉiu argumento kongruu kun specifa semantika rolo
  - Agantoj estu volkapablaj
- Multaj lingvoj preferas eviti senvivajn agantojn
  - Rusa
    - *Таню убило молнией*; *утёсы омываются морем*
    - Senviva aganto esprimita kiel instrumento de implicita aganto
  - Franca (pasive)
    - *suivi par*, *suivi* de
  - Esperanto (pasive)
    - *ŝtuparo kovrita (fare) de iu*, *per tapiŝo*, *de folioj*

La hitita „ergativo”

- En la hitita aganto povas esti aĵgenra, sed...
  - Ne en la kutima nominativo
  - Nur en specifa derivita formo (-*anza*, -*antes*)
    - pahhur (πῦρ) ~ pahhuenanza
  - La derivaĵo estas (gramatike) vivgenra
- Interpreto
  - La „embarraso” plu estas sentata en la hitita
  - Aliaj lingvoj „malpromocias” la aĵgenran aganton al instrumento
  - La hitita ĝin promocias al... vivgenro

Konkludo (1/2)

- Celo de la studo
  - Esplori kiel la semantika nocio vivanteco efikas en diversaj lingvoj
- Atingoj
  - Rolo de vivanteco en genra asignado
  - Komparo de viva genro en tri slavaj lingvoj, ĝia genezo
  - Vivanteco kaj rolmarkado
    - Diferencigita markado
    - Rolo de vivanteco en tippartigo
  - Kiel la PHE-a markado estas kondiĉita de vivanteco
  - Substantiva deveno de la verba konstruo
    - Kiel ĝi klarigas la embarasojn ĉirkaŭ senvivaj agantoj
  - Refuto al refuto al la hipotezo pri PHE-a ergativeco

Konkludo (2/2)

- Fokusetoj al Esperanto
  - Genra
  - Problemoj de objekta markado
    - Anstataŭigaj strategioj
    - Eventuala alomorfeco de morfemo *-n*
  - Neekzisto de krucreferenca markado
  - Esperanto kiel lingvo ideale akuzativ-tipa
  - Embaraso ĉirkaŭ senviva aganto en pasivo
  - Gramatika terminologio

FINO